



Paul GUBBINS [g'benz] naskiĝis la 8-an de novembro 1949 en la banurbo Southport en nord-okcidenta Anglujo (la urbo fariĝis fono de la lernolibro *Kunvojaĝu!*). Li studis la germanan kaj la francan ĉe la Universitato de Manĉestro kaj diplomitiĝis en 1972. Studinte en Kanado, li doktoriĝis en 1978 ĉe Queen's University, Ontario, per disertacio pri la germana verkisto E.T.A.Hoffman. Denove en Britujo, li trejniĝis kiel ĵurnalisto sed fine ekinstruis la germanan ĉe universitato en nord-okcidenta Anglujo. En 2004 li magistriĝis pri aplikado de komputilaj teĥnologioj en edukado. Pro kolapso de lingvo-lernado en Britujo, kaj en lernejoj kaj en universitatoj, li frue emeritiĝis kiel docento pri la germana kaj ekde 2005 instruas ĵurnalismen ĉe Staffordshire University.

Li esperantistiĝis en 1984 kaj sendis sian unuan artikolon al *Monato* en 1986. En 1990 li fariĝis redaktoro pri la rubrikoj *Moderna Vivo* kaj *Politiko*. Ekde 2000 li redaktas *La Brita Esperantisto*. Plurfoje premiita en la belartaj konkursoj de UEA (ĉefe, sed ne ekskluzive, en la branĉo "teatro"), li aperigis plurajn teatraĵojn: la kolektojn *Konto de l' vivo* (1998) kaj *La verda ranaro prezentas* (2006) kaj la unuopajn dramojn *Heksakloro unu komo tri* (2005) kaj *Zam- Zam- Zamenhof* (2006). Krome li aŭtoris rakontojn kaj artikolojn en diversaj periodaĵoj, inkl. de *Fonto* kaj *Beletra Almanako*

Lia lernolibro [Kunvojaĝu!](#) (1993; dua eldono 2006) ricevis en 1996 OSIEK-premion. Li verkis la vidbendserion [Pasporto al la tuta mondo](#) (1998; DVD 2005); la ekzercaron *Subtekste* (1998; dua eldono 2002); du aŭdkomprenajn kompaktdiskojn *Verdaj Voĉoj* (2004; 2007), kaj kontribuis per interagaj ekzercoj al [edukado.net](#).

Dum 15 jaroj li respondecis pri la esperanta somera kursaro en Barlastono, Britujo, kaj ankoraŭ respondecas pri tieaj seminarioj. Li instruis Esperanton aŭ prie prelegis ekster Britujo i.a. en Francujo, Majorko, Italujo, Svedujo kaj Usono (tri fojojn ĉe NASK).

Li membras en la Akademio de Esperanto kaj en la Akademio Literatura de Esperanto. Aktuale li okupiĝas pri esploroj rilate originalajn esperantajn dramojn kaj pri dulingva volumo (angla/esperanta) pri Esperanto-literaturo. Bedaŭrinde la du projektoj signifas malpli da tempo por instruado de Esperanto kaj por lerniloj.

Fonto: Paul Gubbins por la panteono de [www.edukado.net](#), oktobro 2010.

5a de aŭgusto, 2016. Nun venis la malfeliĉiga novaĵo pri la forpaso de nia amiko kaj kolego, Paul.

Bonega kaj ampelksa nekrologo pri Paul aperis en *Libera Folio*. Dankon al Tim Owen pro ĝi. <http://www.liberafolio.org/2016/forpasis-paul-gubbins-la-cefredaktoro-de-monato>